

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Kongreso en
Patagonio**



**La Esperanta
beletro serĉas
historiiston**



**Jubileo de
Belartaj
Konkursoj**



Mondskala dialogo ekas


Vi trovos...

205 **Malferme**

Lerni Eŭropon, Azion, Afrikon...

Tacuo Huĝimoto

206 **INDIĜENOJ EKDIALOGIS TUTMONDE**



El la taglibro de instruisto

Katalin Smidéliusz

208 **Ameriko**

Unuafoje, ekologie en Patagonio

Francisco L. Veuthey

35-a Brazilia Kongreso de E-o

209 **Eksteraj rilatoj**

Kulturo de la paco: komuna kampo

Osmo Buller

Azio

Enderby tra Azio

210 **Junularo**

Naciismo: inter-, sen-, trans-

Grigori Arosiev

211 **Reagoj**

212 **Literaturo**

Kiam venos verko ĉirkaŭbraka?

Humphrey Tonkin

Omaĝo al talento kaj diligento

Vilmos Benczik

214 **Recenzoj**


*Marc van Oostendorp pri
Por aktiva lingvopolitiko*

*Vilmos Benczik pri
Kulturo kaj teknologio,
Kulturo kaj evoluo kaj
Kulturo kaj sano*

*Aleksander Korĵenkov pri
Cxu Esperanto postvivis la jaron 2045?*

*Karina kaj Stefan MacGill pri
Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapič
kaj La kamaradaro de Petro Nodeto*

*Antonio Valén pri
La ĉashundo de la Baskerviloj*



216 **Laste aperis**

Kaj plue

218 **Loke**

219 **Fake – Anoncetoj**

220 **Persone**

221 **Influe**

222 **Esperanto en Radio**

223 **Indekso 1999**

La kovrilo:

Kantado ĉe
Indiĝenaj Dialogoj
(UEA / F.L. Veuthey)

Dekstra paĝo:

Juna kato (Franĵo
Veuthey)

ESPERANTO


*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.
Grafiko: Francisco L. Veuthey.
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.
Legata en 115 landoj.
Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.
Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (Den Haag).
Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: +31-10-436-1044.
Telefaksa: +31-10-436-1751.
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.
TTT-paĝo: http://www.uea.org
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.
Direktoro de la Centra Oficejo:
Pasquale Zapelli.



LERNI EŬROPON, AZION, AFRIKON...

Nun, 112 jarojn post la Unua Libro, ekzistas tre multe da libroj en Esperanto, malnovaj kaj novaj, pri diversaj temoj. Mi mem povas aĉeti nur kelkajn el la nove eldonitaj en ĉiu jaro. Ĉe la Berlina UK mi enmanigis al mi du: *Lingva arto* kaj *75 jaroj*. (En la oktobra numero aperis recenzo de Carlo Minnaja ĝuste pri la paro.)

Eĉ unu libron el ili mi ankoraŭ ne finlegis, kaj en la unua mi legas pecon post peco laŭ okaza prefero. Por tiaj legoj ĝi estas taŭga, ĉar enestas pli ol 20 eseoj. Jena loko (de Giorgio Silfer) tiris mian atenton:

“Lernante esperanton, ĉiuj lernas ankaŭ la scivolon pri aliaj popoloj; sed ekstereŭropanoj lernas Eŭropon, dum eŭropanoj apenaŭ lernas Azion kaj Afrikon, tra esperanto, tra ĝiaj literaturo, muzika repertuaro ktp” (*Lingva arto*, p. 181-182).


Se estas tiel, ĉu mi, aziano, lernis Eŭropon? Mi ne estas certa pri tio, sed mi certe uzis multe da tempo kaj energio sole por lerni Esperanton tra ĝia literaturo. Mi havas la impreson ke mi devis legi multe da libroj kaj gazetoj en Esperanto por ellerni la lingvon, ke dume mi apenaŭ povis apreci ilian literaturan valoron. Kun memfido diri mi ne povas ke tra Esperanto mi lernis ion eŭropan. Tial mi tute ne plendas, se eŭropanoj apenaŭ lernas Azion kaj Afrikon.

En Greziljono, kie esti plaĉas al mi, oni demandis: kial okazas ke multaj e-istoj japanaj ne povas paroli

nialingve eĉ en tia grado kiu sufiĉus por kompreni ilin? Mi simple respondis: ĉar Esperanto estas tamen malfacila por ni japanoj, kies lingvo tute malsamas de ĝi. Mi konas unu eŭropan esperantistinon kiu dum la UK-semajno klopodas kiel eble plej ofte alparoli mentore komencantojn, precipe japanajn, ĉar ŝi foje estis en Japanio kaj konatiĝis kun la malfacileco de kiu suferas la komencantoj provante paroli Esperanton.

Malgraŭ ĉio, revenas la Zamenhofa Festo la 15-an de decembro. Tiam estas ankaŭ la Tago de la Libro Esperanta. Jam antaŭ longe mia edzino demandis min: kiu, en la tuta historio de Esperanto, plej multe skribis en la lingvo? Mi respondis preskaŭ spontane: verŝajne, Zamenhof. Ĉu efektive estis kaj ankoraŭ estas tiel, mi ne scias. Ĉiuokaze, li multe tradukis, kaj estus malfacile superi lin ankaŭ en la kvanto de tia verklaboro. Krom tio por ni ĉiuj esperantistoj estos tre malfacile superi la staturon de L. L. Zamenhof ankaŭ ideologie, pro lia homaranismo. Ja, preskaŭ ĉiuj el ni estas, konscie aŭ senkonscie, esperantistoj “pro interna ideo”. Sed homaranismo estas alia afero, kaj mi mem ne kuraĝas nomi min homaranismano. Mankas al mi pozitiva agemo por esti tio. Do, okaze de la Librotago mi almenaŭ legu ion de Zamenhof (kaj ankaŭ iom de aliaj aŭtoroj).

Tacuo Huĝimoto



**Bone aŭguras la
sukceso de la unua
trisemajna kurso**

**kadre de la projekto Indiĝenaj
Dialogoj (ID), daŭranta ĝis 2005.**

7u eksterordinara projekto (vidu feb., p. 24) ekdisvolviĝis pasintjare, laŭ iniciato de Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge el la lingvo-instituto Narwal en Wassenaar (Nederlando). ID celas doni al la organizaĵoj de indiĝenaj popoloj rimedon por libere kaj senpere kunlabori kaj interkomunikiĝi. La rimedo estas Esperanto kaj ĝia uzo en la komputila reto. (Vidu ankaŭ ĉe <http://www.uea.org>, sub "Projektoj").

Kiel oni povas imagi, Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge renkontis ne nur simpatian sed ankaŭ fortajn dubojn pri la realigebleco de la projekto, kiam ili komencis prezenti ĝin al eblaj partneroj. Tamen jam en oktobro 1998 la Estraro de UEA decidis apogi la projekton kaj asignis al ĝi aŭspiciojn de UEA. Sekve ĝi ricevis diskonigon ĉi-revue kaj dum la maja konferenco de la Haga Alvoko por Paco (jun., p. 104). Esperantistoj en pli ol dek landoj enplektiĝis en ID, ekzemple per tradukado de kursotekstoj kaj kiel "geonkloj", kiuj rete korespondas kun la kursanoj, por ke ili spertiĝu en la lingvouzo.

La nelacigeblaj gvidantoj de Narwal sukcesis varbi por la projekto plurajn partnerojn kaj sponsorojn, i.a. Nederlandan Centron por Indiĝenaj Popoloj, Instituton por Tutmonda Edukado kaj la bankojn ASN kaj Triodos.

**Kantado samtempe
malstreĉis kaj lingve
instruis la kursanojn.**



Indiĝenoj ekde tutmonde

Konstrui ponton

La monata revuo *IS – Internationale Samenwerking* ("Internacia Kunlaboro") de la nederlanda ministerio pri eksterlandaj aferoj dediĉis en oktobro preskaŭ tutan paĝon al la projekto Indiĝenaj Dialogoj.

La artikolo "Esperanto konstruas ponton inter kulturoj", kun la subtitolo "Kurso pri komunikado por indiĝenaj popoloj", prikskribas la celojn de ID kaj raportas pri la unua kurso. Snam Stanley Iko el la madanga popolo (Papua Novgvineo) resumas jene la filozofion de ID: "Mi kredas ke Esperanto

povas konstrui pontojn inter homoj, ĉar la mondo havas lingvoproblemon. Unu parolas tion kaj la alia tion ĉi, sed ni devas lerni kompreni unu la alian kaj la mondon."


Siaflanke, la televido NOS raportis pri ID en 5 minutoj de sia tagmeza novaĵprogramo la 23-an de septembro.

ialogis



Dek ok popoloj

La unua kurso, en septembro, estis la unua granda sukceso de la projekto. Ĝiaj 22 lernantoj laboris en 4 grupoj, dividitaj laŭ la instru-helpe uzata lingvo (angla, franca, hispana, rusa). La kursanoj reprezentis indiĝenajn organizaĵojn kaj 18 popolojn el Papua Novgvineo, Maroko, Ruando, Burkino, Ruslando, Alasko, Kostariko, Gvatemalo, Ĉilio kaj Barato. Dum la unua semajno ili intense studis Esperanton. En la postaj semajnoj ili lernis uzi komputilon, korespondi rete kaj krei hejpaĝojn. Jam dum la dua semajno ili ekkontaktis siajn geonklojn. La programon estris la iniciatintoj Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge. La instruistaro estis internacia: Antonio Leoni de León el Kostariko, Aleksander Melnikov el Ruslando, Katalin Smidélus el Hungario kaj Atilio Orellana Rojas el Argentino.



Tuaregino kaj siberianoj sur la komuna grundo de kursejo Narwal. Supre: latin-amerika triopo.

El la taglibro de instruisto

Ĝenerale la matena instruado komenciĝas je la 9-a horo. Por ĉiu tago ili havas 5-8-paĝan tekston en Esperanto kaj paralele en la ponto-lingvo, kiun ni prilaboras laŭ la sugestopedia metodo. La E-versio estas laŭlegata (ofte kun muziko), kaj ili povas ŝtelrigardi la tradukojn por sekvi la enhavon, kiu estas lingve tute ne simpla, enhave kaj morala kaj instrua; temas pri saĝoj, pri la vivo de indiĝenaj popoloj ktp.

Okazas ankaŭ formala instruado, sed ĉio per tre aktiviga metodo; eĉ ne unu minuton ili povas resti malatentaj. Forfuĝanta rigardo post unu metro certe trafas iun el la gramatikaĵoj per kiuj ni plenigis la murojn. La parajn dialogojn ili tre ŝatas: post la preparoj ili mem elektas partnerojn kaj ekzerciĝas laŭte, en granda brua haoso.

La instruado daŭras ankaŭ posttagmeze (fakte, ĉie kaj ĉiam, tage kaj nokte), kun iom da paŭzoj. Dum la naciaj vesperoj mi travivis la plej belajn horojn kiujn mi ĝis nun spertis en internacia medio.

(En la lasta tago:) Ili komprenis ke ili havas amikojn en la mondo. Raymond el Alasko rakontis ke, antaŭ ol veni tien ĉi, li ne interesiĝis pri tio kie troviĝas Barato, nenion sciis pri Papua Novgvineo, edukiĝis en etoso malamika al blankuloj... kaj nun ĉio tio ŝanĝiĝis, lia animo, koro pliriĉiĝis. La partoprenantoj estas gravuloj en siaj organizaĵoj, do reveninte hejmen ili certe povos fari multon por transdoni la ĉi tie akiritajn informojn kaj kapablojn.

Katalin Smidélus

UEA premiis en la lasta vespero la kursanojn per la libro *Homaj rajtoj: demandoj kaj respondoj* kaj la instruistojn per *Lingva arto*. Kiel ekstran premion, la plej progresintaj lernantoj ricevis membrecon en UEA.

Unu monaton post la fino de la kurso, Bessie Schadee kaj Sylvain Lelarge raportis ke “duono de la grupo aktive uzas Esperanton, kaj la aliaj iĝis efikaj ambasadoroj, kaj ankaŭ ili verŝajne finfine aktive uzos Esperanton”.

Jam fine de novembro sekvis dua kurso por 12 lernantoj, kun sama skipo de instruistoj. Laŭ la plano la projekto aligos ĝis la jaro 2005 reprezentantojn el ne malpli ol 250 indiĝenaj popoloj.

Kiu deziras subteni akiron de lerniloj k.a. materialoj por ID, povas fari tion per donacoj al

la konto de Kampanjo 2000 ĉe UEA, kun la indiko “Por Indiĝenaj Dialogoj”. Bonvenas ankaŭ helpo de tiuj kiuj pretas traduki kaj redakti tekstojn, kaj de “geonkloj”, rete helpontaj la postkursan lernadon. Adreso: Sylvain Lelarge kaj Bessie Schadee, Narwal, Oud Clingendaal 7, NL-2245 CH Wassenaar, Nederlando; ☎ +31/70/517-75-23; ☎ 517-66-82; ✉ narwal@usa.net. ★

Unuafoje, ekologie en Patagonio

"Naturprotektado kaj vivkondiĉoj" estis la temo de la 53-a Argentina Kongreso de Esperanto, okazinta de la 8-a ĝis la 11-a de okt. 1999 en urbo patagonia, San Carlos de Bariloche (provinco Río Negro), ĉe la piedo de la imponaj Andoj.

Francisco L. Veuthey

ĉen-reago, ekestas aliaj "E-kernoj" tra la sudo de la kontinento. BER estas ankaŭ la lulilo de Alejandro Cossavella, premiito de Belartaj Konkursoj en 1998, kies bando *La porkoj* aperigis diskon ĉe Vinilkosmo. Krome la grupo eldonas informfolion kaj TTT-paĝon (<http://www.geocities.com/Athens/Styx/4809>).

Se vi planas viziti Sudamerikon, nepre notu ankaŭ Bariloĉon. Restu en la esperantema gastejo Los Notros, kaj konatiĝu

Pri neformala, familia etoso zorgis la ĉarma gastejo Los Notros, donanta idealan kadron meze de naturo.

Diverskiale forestis ĉiuj estraranoj de Argentina E-Ligo (AEL), sen kiuj la kongreso ne sukcesis atingi sian tradicion tridekon. La foresto de aŭtoritatoj el la malfermo malnecesigis la kutiman tradukadon en la hispanan, kio kunportis belan sekvon: foreston de krokodilemo ankaŭ dum la cetero.

La amaskomunikiloj preferis samtempan naciskalan renkontiĝon de dek mil virinoj en la sama urbo. Spektante ilian marŝadon, kongresanoj Rubén Sánchez kaj Enrique Ellemberg (kiuj ankaŭ zorgis pri "vivanta raporto", t.e. detala ĉiutaga aktualigo pri la kongresaj okazaĵoj en la reto) sukcesis persvadi unu ĵurnalistinon, kiu intervjuis ilin kelkminute por unuhora TV-programo pri la provinco Río Negro.

La kongresan temon enkondukis lumbilda prezento pri la lokaj flaŭro kaj faŭno (Marcela Ferreyra), sekvatage aŭdiĝis kortuŝa kaj diskutveka prelego de Margarita Johnston pri la modela medi-amika urbo El Bolsón, kaj la fermo venis el Ĉilio (José Antonio Vergara) pri la ekologia movado.

Estante AEL pli bone flegu la organizon de siaj kongresoj, por eviti ke, pro nesperteco de LKK, manku kongresdokumentoj, atestilo pri partopreno, kaj iu artemulo por vivigi la vesperojn.

La brava BER-o

La organizo de tiu ĉi kongreso plene ŝuldiĝas al la bravaj membroj de la nova Bariloĉa E-Rondo (BER), unikaĵo en la sudamerika movado — ne nur pro la intelekta nivelo de ĝiaj membroj, sed ankaŭ pro ilia efikeco disradii E-on al la apudaj regionoj. En nur du jaroj da aktivado ili jam kalkulas je estoj en urboj Epuyén, Villa La Angostura, El Bolsón, Pilcaniyeu k.a. Per prelegoj, kursoj, intervjuoj, artikoloj kaj kontaktoj kun ĵurnalistoj, lernejestroj, pastroj kaj aliaj influhavaj personoj, ilia agado transpasas Andojn kaj atingas Ĉilion. La taktiko de BER simplas sed sukcesas: ne nur instrui (ĉeeste kaj perpoŝte), sed ankaŭ instigi la novulojn siavice disvastigi la lingvon ne nur en la propra, sed ankaŭ en la apudaj urboj. Tiel, kun la geometriea disvastigo de

Gilbert Ledon



35-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Ĉirkaŭ 250 esperantistoj partoprenis la 35-an Brazilan Kongreson de Esperanto (12-16 jul.) en Campo Grande, ĉefurbo de la ŝtato Mato Grosso do Sul.

La kulture kaj arte riĉa programo inkluzivis prelegojn pri E-eldonado (Fabrício Valle), E-kulturo (Sylla Chaves), E-ekologio (Gilbert Ledon) kaj E-turismo (Fernando Marinho), laŭ la ĉeftemo "Esperanto, kulturo, ekologio kaj turismo". Koncertis la rok-bando Merlin, konata pro sia kompakta disko *Por la mondo*.

Unu el la kongresaj gastoj estis Osmo Buller, kiu restadis de la 6-a ĝis la 14-a de julio en Brazilo, precipe por viziti la urbon Fortaleza en la ŝtato Cearao, kandidatan por la 87-a UK en 2002. (Poste la Estraro de UEA efektive elektis Fortaleza.) En Campo Grande, Buller plantis kun la urbestro E-arbon ĉe la urbodomo.

kun BER kaj la mirinda naturo, kiu ĝin ĉirkaŭas. Kontakto: BER, C.C. 371, AR-8400 San Carlos de Bariloche, ✉ hostlnotros@infovia.com.ar.★

Kulturo de la paco: komuna kampo

Osmo Buller

La ĝenerala direktoro de UEA, Osmo Buller, laborvizitis la Parizan sidejon de Unesko en kulmina momento de ties Ĝenerala Konferenco, la 11-an kaj 12-an de novembro.



Nome, ĉi tiam estis elektita la nova ĝenerala direktoro de Unesko. Buller kaj la konstanta Unesko-representanto de UEA, Vincent Charlot, ĉeestis la elekton de la japana diplomato Koichiro Matsuura al tiu posteno por la periodo 1999-2005. La prezidanto de UEA kaj ĝia japana estrarano Tacuo Huĝimoto sendis al Koichiro gratulmesaĝojn.



Koichiro Matsuura, la nova Ĝenerala Direktoro de Unesko. Dekstre supre, Unesko-simbolo por Manifesto 2000.

La plej grava temo dum la diskutoj en Parizo estis la kontribuo de la Esperanto-komunumo al la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco en 2000. Lige kun tiu Jaro estis lanĉita Manifesto 2000 por Kulturo de Paco kaj Senperforto (vidu nov., p. 185). Ĝin iniciatis grupo de laŭreatoj de la Nobel-pacpremio, i.a. Miĥail Gorbaĉov, Nelson Mandela, Ŝimon Peres kaj José Ramos Horta.

La delegacio de UEA prezentis la planon de UEA pri kolektado de subskriboj por Manifesto 2000 al Enzo Fazzino, respondeculo en Unesko pri tiu dokumento. Fazzino tuj aliris sian komputilon por serĉi la TTT-paĝojn de UEA, kie jam nun eblas subskribi la Manifeston. UEA baldaŭ eldonos ĝin ankaŭ kiel faldfolion, por ke

ankaŭ tiuj sen retaliro povu ĝin subskribi. La granda celo de Unesko estas kolekti 100 milionojn da subskriboj, kiujn oni transdonos al la Ĝenerala Asembleo de UN en septembro 2000. Por akceli la kolektadon, Unesko planas eldoni diplomon por "Heroldoj de Manifesto 2000", t.e. aktivaj kolektantoj. Vidinte la aktivecon de UEA, Fazzino promesis

presi la diplomon ankaŭ en Esperanto. La agado de UEA por la kulturo de paco estis diskutata ankaŭ en la kunveno kun Monique Fouilhoux, prezidanto de la Kontaktkomitato de NRO-j. Ŝi dankis al UEA pro ĝia subskribo de Kontrakto pri Partnereco por la Kulturo de Paco. La ĉefa evento, per kiu UEA kontribuos al la Internacia Jaro por la Kulturo de Paco (IJKP), estos la 85-a Universala Kongreso en Tel-Avivo, kun la temo "Lingvo kaj la kulturo de paco". Dank' al la Kontrakto pri Partnereco UEA ricevis la rajton titoli ĝin "Flagŝipa Evento de IJKP". Estis interkonsentite ke Patrick Duong, respondeculo pri IJKP ĉe la Kontaktkomitato de NRO-j, partoprenos kaj prelegos en la Tel-Aviva UK. ★

Enderby tra Azio

La prezidanto de UEA, Kep Enderby, lastatempe dufoje restadis en Azio.

Partopreninte en la Dua Azia Kongreso (nov., p. 182), Enderby vizitis fine de aŭgusto Tajlandon. Kun granda helpo de la 88-jara pastro Francisko Andreoni, li prelegis en la ĉefurbo Bankoko pri Esperanto angle al studentoj kaj profesoroj de la universitatoj Assumption kaj Saint John's, prezentante i.a. la ILEI-projekton Interkulturo. Li donis plurajn intervjuojn, kio liveris riĉan informadon rezulton.




Kep Enderby

En oktobro Enderby vojaĝis en Koreio kaj Japanio dum preskaŭ tri semajnoj. En Koreio li unue ĉeestis la landan E-kongreson (9-10 okt., Seulo), kiun eblis "viziti" ankaŭ Interrete (<http://www.liveto.com>). Li prelegis pri la kongresa temo "Lingvo-problemoj en internaciaj neregistaraj organizaĵoj", prelude al sia partopreno en samurba internacia konferenco de NRO-j (nov., p. 185).

Kun UEA-prezidinto LEE Chong-Yeong kaj kun LEE Ĝongse, Enderby flugis al la 86-a Japana E-kongreso (15-17 okt.) en Motizuki ĉe Nagano, fama pro vintraj olimpikoj. Li prelegis malferme pri "Kial la mondo bezonas E-on" kaj ĉeestis kunvenon de Komisiono de UEA pri Azia E-Movado.

En intensa programo tra la insuloj Honŝuo kaj Ŝikokuo, Enderby diversloke prelegis E-lingve, ankaŭ al nemovada publiko, pri Esperanto, aborigenoj, multkulturismo kaj homaj rajtoj. Li krome renkontis gvidajn oficistojn de Amnestio Internacia, Federacio de Unesko-asocioj de Japanio kaj Oomoto.



KARL MAY

Liberigo / Eine Befreiung

La verkoj de la germana aŭtoro Karl May (1842-1912) de longe apartenas al la klasikaĵoj de la aventura literaturo. Unuafoje unu el liaj rakontoj tradukiĝis al la internacia planlingvo Esperanto kaj unuafoje teksto de Karl May troviĝas dulingva en unu libro.

Editorita de H.D. Steinmetz, trad. Cornelia Rau, Bamberg: Karl-May-Verlag, 1999. 240p. Bindita. ISBN 3-7802-3005-4. Prezo: € 18,30.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA (triona rabato ekde 3 ekz.)

PLI OL 7000 INDIVIDUAJ MEMBROJ

La 13-an sinsekvajn jaron, en 1999 la individua membraro de UEA superis 7000. La 24-an de nov. UEA havis 7010 IM en 118 landoj: nombro kreskonta, ĉar kotizoj konstante enfluas. Konsilindas pagi la kotizon kiel eble plej frue, sed eblas kotizi kiam ajn kaj ricevi la jam aperintajn eldonaĵojn de UEA plus, en kazo de junaj membroj, tiujn de TEJO.

ILEI-NOVAĴOJ

La 34-a ILEI-Konferenco (15-21 julio, Kvinpetalo, Bouresse, Francio) temos pri "Lingvolernado serve al interkultura edukado." Kontaktu: Jeniffer Bishop, 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio; desperanto@education.monash.edu.au. Konferencajn pagojn sendu al la UEA-konto "ilek-a" aŭ al la poŝta ĝirkonto 682117-7 (Stockholm) de ILEI.

Nova ILEI-kasistino: Boo-Mee Kim-Lindblom: Stenbockensg. 102, SE-13 662 Haninge, Svedio; [+46/8/777-41-75](tel:+4687774175); boomee.kimlindblom@swipnet.se.

Nia raporto (okt., p. 165) malhavis la informon ke, krom sekcion en Togolando, la 33-a ILEI-konferenco akceptis sekcion ankaŭ en Katalunio.

Naciismo: inter-, sen-, trans-

Grigori Arosiev - Rusio

Kiel tradicie, Strasburgo gastigis seminarion de TEJO (24-31 okt.), pri la temo "Internaciismo kaj naciismo: ĉu konfliktaj aŭ kompletigaj ideoj?"



Kiam mia aviadilo alteriĝis en Frankfurto, mi iom bedaŭris ke mi estas organizanto, ne vera partoprenanto. Kial? Ĉar mi ne povis antaŭgŭi la seminarion kiel ion nekonatan. Dum la preparperiodo la kvin anoj de OrgTeamo laboregis, kaj por la komenco vere preskaŭ ĉio iĝis klara.

En Eŭropa Junulara Centro (EJC) de Konsilio de Eŭropo kolektiĝis bunta 35-opa grupo el 26 landoj de Azio, Afriko, Ameriko kaj Eŭropo. (EJC ebligas venigon de 2-3 partoprenantoj ne-eŭropaj, eblo kiun TEJO vigne uzas.)

La temon oni pritraktis multaspekte kaj multrimede. Ĉefprelegis Ziko M. Sikosek, profesia kaj movada historiisto, pri la nocio "naciismo", kaj Vittorio Dell Aquilla, itala lingvisto, pri "Lingvo kaj identeco" kaj "La ŝtato kaj lingvoj". Internaciismo prezentiĝis per prelegoj de Ilja De Coster kaj Ziko. La scienca programon finis Mark Fettes, estinta ĝenerala sekretario de UEA, pri Esperanto kaj internaciismo, naciismo kaj sennaciismo, rakontante pri la mondkonceptoj de la plej elstaraj personoj de la E-movado (Zamenhof, Privat, Hodler k.a.).

Ziko kaj Vittorio kune gvidis la simulludon "Registaro de multlingva lando", en kiun la partoprenantoj, loĝantoj de la fikcia lando Kukumio, devis objektivite decidi pri la uzo de limigita kvanto da monunuoj por solvi la problemon de edukado de la kukumiaj minoritatoj. Tiu ludo instruis serĉi kompromisojn. Sed plej elstara estis alia simulludo, Albatroso, kiun gvidis nia neplentempa kuratoro Anne Dussap. Ni ĉiuj lernis komuniki kun absolute fremdaj kulturo kaj medio.

Post ĉiu prelego kaj ludo disvolviĝis diskutoj ardaĵ kaj longaj, spicitaj de opinioj de ekstereŭropanoj kun freŝa kaj nekutima rigardo al konataj problemoj.

La vespera programo enhavis Internacian Vesperon kun naciaj manĝaĵoj kaj muzikoj; kulan teatran vesperon kun la anoj de najbara seminario (bedaŭrinde, parte anglalingve) kaj, en la lasta vespero, komunan koncerton, kie ĉiuj rajtis prezenti absolute ĉion.

La seminario bone trejnis kaj edukis, sed ĝi ne alportis iun konkretan rezulton, ekz. dokumenton kiun TEJO povus utiligi. Fakte bedaŭrinde, sed riparebla en sekvaj fojoj. ★



Amikeco trans limoj

INTERNACIA SEMAJNO DE AMIKECO


Kiel ĉiujare, la lasta plena semajno de februaro (20-26) staros sub la devizo "Amikeco trans limoj". Kreita por konsiĝi pri la amikiga rolo de internacia lingvo, ĝi estas aparte taŭga okazo por aranĝi komunan eventon kun neesperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj.

Reagoj



Einstein kaj Esperanto

Komplemente al la temo (jul.-aŭg., p. 127), eble interesos la ofte aludita skriba konsento de Einstein al Lanti (tiam li skribis Lanty), redaktoro de la ĉiumonata *Sennacieca Revuo*, esti honora prezidanto de la 3-a kongreso de SAT en Cassel (1923):



“Perjone mi konsentas, ke vi faru min honora prezidanto de via Kongreso. Mi dankas al vi pro la pruvo de simpatio kaj mi deziras plej bonan sukceson al via entrepreno. Kun atestimo (*Sennacieca Revuo*, aŭg.-sept. 1923, p. 1).

Ne solan fojon eminenta persono kiu apogis E-on, poste asertis la malon. Tiel faris i.a. franca akademia rektoro, H. Pariselle. En 1938 li kontrolis en Besançon la ministran eksperimenton pri la valoro de Esperanto en la lernejoj. Li tiam estis vicprezidanto de Unuiĝo E-ista Franca. En oktobro 1946, demandite de Louis Bastien, kiu volis starigi honoran komitaton de eminentuloj apogantaj E-on, Pariselle, tiam rektoro en Grenoble, respondis (el la franca): “Sinjoro Generalo — Kvankam ne scipovanta Esperanton, jam de longe mi estas simpatianto, kaj tre volonte mi konsentas pri mia patronado”. (Mi posedas la originalon.)

Ne longe poste, demandite pri Esperanto de Louis Beaucaire (kiun mi nun citas), “la universitata moŝto kolere protestis, ke li ne scias, kiu inventis tian stultaĵon”.

Tiel pasas la homoj, eĉ se “eminentaj”, dum pluraj Esperanto.

Jean Amoureux - Francio

Ĉu necesas takte blufi?

Nepre mi konsentas kun A. de' Giorgi (marto, p. 53) ke estas plej malfacile respondi la demandon “Kiom da homoj parolas E-on en la mondo?”, sed ne pri tio ke “ankaŭ utilas iom (takte) blufi, troigi, fanfaroni”.

Plurfoje mi mem reagis per kontraŭdemando: “Ĉu vi scias kiom da homoj en la mondo scias naĝi?” Neniu kapablas respondi al tio. Multaj milionoj scias naĝi, multaj dekmiloj eĉ bonege, sed registritaj ili estas nenie. Tia reago ne taŭgas ĉie ajn, sed kun aldonaj argumentoj jam plurfoje mi konvinkis homojn ke vere ne eblas “kalkuli” e-istojn.

Nora Caragea - Germanio

Ĉu de supre? De sube...?

Mi unue pensis kabei kiam mi legis en la estrara raporto (jun., p. 110): “Tre danĝere ĝeneraligaĵas ideoj pri nur desuprismo kaj desubismo, ĉar ambaŭ nepras. Male, laŭ niaj kompetentaj kaj cirkonstancoj, ni klopodu agadi ne nur de supre kaj de sube, sed ankaŭ de dekstre, de maldekstre, vertikale, horizontale, oblikve, de ene, de ekstere, pere, senpere,... interŝanĝante spertojn por reciproke plibonigi niajn agadojn.”

Stultega estas akra disputo pri *desuprismo* kaj *desubismo*, ĉar ambaŭ nepras. Male, laŭ niaj kompetentaj kaj cirkonstancoj, ni klopodu agadi ne nur de supre kaj de sube, sed ankaŭ de dekstre, de maldekstre, vertikale, horizontale, oblikve, de ene, de ekstere, pere, senpere,... interŝanĝante spertojn por reciproke plibonigi niajn agadojn.

Germain Pirlot - Eŭropa Unio



Hamburgaĵa tutmondiĝo

Impresas la titolo (“Shakespeare en hamburgaĵa skatolo”) kaj parte ŝokas la enhavo de oktobra artikolo (p. 162).

Kiel multaj, ankaŭ s-ro Tonkin uzas la “vastan” vorton *tutmondiĝo* pensante nur pri la mizera procedo lastatempe draste aplikata de la multaj “evoluintaj” landoj de nia granda mondo.

Temas pri la klubo de la konataj 20-25 plej riĉaj, plej potencaj landoj, kiuj, por sia ekonomia interproksimiĝo, jam sukcesis unuigi sub la standardo de nova komuna kulturo, kun la koloroj de Coca-Cola kaj la figuroj de Disney.

“En ĉiu hamburgaĵa skatolo de McDonalds kuŝas (...) donaco, kiu nomiĝas Beethoven, (...) Shakespeare” k.s. — skribas Tonkin. Oni devas memorigi ke en la samaj skatoloj kuŝas ankaŭ bomboj

kaj minoj, abundaj pliaj “bonaĵoj”, kaŭzantaj malsaton kaj malsanojn, suferojn kaj larmojn, morton kaj katasstrofon al la cetera mondo, al tiu de la eksterklubanoj.

Multaj milionoj da infanoj mortas, ĉar la politiko aplikata de ties despotoj ne konvenas al la planoj de la potencaj gvidantoj de la hamburgaĵa “tutmondiĝo”.

Ni ĉiuj bone scias ke ni babilas pri tutmondiĝo ne ekzistanta, pri afero malvera kaj falsa. La tuta mondo estas afero treege granda, en kiu estas miliardoj da homoj kiuj tute ne scias kio estas Coca-Cola, kio hamburgaĵo, kio komputilo, kio Beethoven, kio Shakespeare ktp. Sen tiuj homoj, sen la ceteraj 80% de nia mondo, ni ne povas serioze paroli pri “tutmondiĝo”, eĉ ni ne rajtas fari tion ĝuante niajn “donacplenajn” hamburgaĵojn.

Spiros Sarafian - Grekio

El la poŝtkesto

Kie ni staras?

Jen kelkaj demandoj pri nia movado. Kion signifas nun la Bulonja Deklaracio? Ĉu “esperantisto” restu celanto disvastigi la neŭtrale homan lingvon? Do, ĉu ni rajtas nur filateli, komerci, korespondadi, servi la belajn artojn, se ni konscias nian limigitan povon varbi senpere? Se mankas la “kern-idea” inspiro?

Ja ne ĉiu ardas suferante kiel Zamenhof, varmas kiel Auld, Boulton, Piron...

Ĉu ankaŭ silferoj ne helpas konstrui nian kulturon — modeste, sed ne tro?

Kaj kion pri la luksa ikonoklasmo de Ziko Sikosek? Ĉu ekzemplas Drezen (*Zamenhof*), eĉ pli esperantisme Ludovikito (*Senlegenda biografio*, kontraŭkanta al la japana verkego *Zamenhofu*)? Ĉu tiom timi la kritikon de la ĉion-detruema amaso ke ni forrezignu ĉion nepruveblan por ne-inicitoj?

Kaj fine: ĉu resti demandanta aŭ ĉu plu fosi nian kanaleton, ĉar homeco pli ol necesas pro la novaj fluegoj da senhejmigitoj?

Rob Moerbeek - Nederlando

Eseoj de Tárkony kaj precipe de Kalocsay en la antaŭmilita periodo montris la vojon, kaj lastatempe venis la unua serioza klopodo verki literaturan biografion (*Poeto fajrakora*, Boulton pri Baghy, 1983), la unua historio de la romano en Esperanto (*Vereco, distro, stilo* de Auld, 1981) kaj kolektoj de kompetentaj studoj pri unuopaj verkistoj aŭ temoj (*Studoj pri la Esperanta literaturo*, Benczik, 1980; *Beletraj eseoj*, Miĥalkov, 1987 k.a.). Aperis dise tra festlibroj kaj aliaj kolektoj similaj studoj seriozaj. La du eldonoj de *Esperanta antologio* de Auld, per siaj kritika elekto, enkondukoj kaj biografietoj, markis vojon tra la vepro poezia. Efektive nur Auld, en *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* (1979), klopodis doni kritikan superrigardon de la tuta historio de nia (originala) literaturo; *Kvar prelegoj pri esperanta literaturo* de Drago Kralj (1960), la sola alia tia pretendo, kvankam utila, estas apenaŭ pli ol kronologio, stile simila al aliaj katalogecaj verkoj, kiel la literatura parto de *Esperanto en perspektivo* (1974), *Skizo pri la Esperanta literaturo* de Vlastimil Novobilský (1956) aŭ, laste, *Skizo de la Esperanta literaturo* de Eduard V. Tvarožek (1998).

La burĝonanta literaturo de Esperanto pli kaj pli insiste levas la bezonon je verkoj kiuj povas ĉirkaŭbraki la tuton kaj ĝin interpreti kompreneble, kritike kaj senteme. Serioza interesiĝanto pri la E-literaturo dume aĉetu la menciitajn verkojn de Auld, Boulton kaj Benczik, al kiuj nepre aldoniĝu la unuaklasaj eseoj de Waringhien.

Sed kiam fine venos inkluziva historio de nia literaturo? Verki historion de kiu ajn literaturo iĝis pli malfacile en nia epoko, pro duboj profundaj pri tio kio konsistigas literaturan "gravecon": verki historion estas preni politikan pozicion, kaj preni politikan pozicion estas kvazaŭ konfesi la


eblecon ke ekzistas aliaj malsimilaj tiaj pozicioj. Leviĝas ankaŭ ĉiam pli insista demando pri la konsisto mem de difinita literaturo. Kiugrade la usona literaturo kaj la brita estas klare divideblaj? En mondo kie hindaj verkistoj verkas angle por esence internacia legantaro, aŭ kie latin-amerikaj verkistoj antaŭvidas ke oni legos pli da ekzempleroj de iliaj verkoj en angla traduko ol en la hispana originalo, aŭ

geble aparta E-literaturo, ĝi restis profunde influata de diversaj fluoj naciaj kaj regionaj, kiujn niaj kritikistoj plejparte ne alfrontas en siaj eseoj (krom eble iagrade Waringhien). Se, kiel Auld pretendas en *Kulturo kaj internacia lingvo* (1986), Esperanto komencas naski vere internacian kulturon, kiel tiu internacia kulturo rilatas al la naciaj? Kaj ĉu aliaj formoj de internaciaj kulturoj ekestas, ekz. pere de la angla lingvo? Eventuale

eĉ oni povas nun difinigi tutmondan kulturon de la ĉiulanda elito, kiu pere de siaj diversaj komunikkanaloj kvazaŭ silente interkonsentas pri la tekstoj kiujn ĝi traktos, eĉ se tiuj verkoj originas en diversaj lingvoj kaj estas legataj en diverslingvaj tradukoj. Tiu internacia literatura kulturo estas unuavice difinita de romanoj kaj filmoj kaj certgrade ankaŭ de televido. Ne temas ankoraŭ pri tio ke ili ĉiuj membras en la sama libroklubo, sed ili ĉiuj ja submetiĝas al similaj merkataj influoj.

Kiam venos verko ĉirkaŭbraka?

Humphrey Tonkin - Usono



"Kvankam ne nula, la serioza kritika verkaro pri la Esperanto-literaturo estas ĝis nun tre minimuma. Estas tempo ŝanĝi tion" – invitas prof. Tonkin verkemulojn.

kiam duono de la romanoj (aŭ pli) kiuj cirkulas en Germanio, venas el britaj kaj usonaj originaloj, nek geografio nek lingvo ŝajnas adekvate difinita bazo por verki literaturan historion. Niaj kulturaj komunajoj pli kaj pli ofte transsaltas geografion kaj lingvojn.

Lingvo kaj internacia kulturo

En Esperanto la problemoj estas aparte malfacilaj. Niaj fruaj verkistoj plejparte verkis nur por pruvi ke oni (oni, ne ili) entute povas verki en inventita lingvo: ili celis imiti la ekzistantajn literaturojn. Jam dekomence Zamenhof kaj liaj samtempuloj faris tradukojn — por evoluigi la literaturan lingvon, por kvazaŭ verŝi en la naskiĝantan E-literaturon la influon de plej bonaj literaturaj modeloj, kaj por verŝi en la lingvon novajn esprimojn kaj defiojn. Kiam — spronate de Kalocsay, Baghy kaj aliaj — komencis konturiĝi distin-

Tasko por talentuloj

Kunlaboro inter niaj plej talentaj literaturaj kritikistoj povus, laŭ mia imago, krei inkluzivan literaturan historion de Esperanto, kiu ne nur ekzamenus la rilatojn inter la diversaj verkoj kaj aŭtoroj ene de la E-komunumo, sed ankaŭ esplorus la rilaton inter la originala literaturo kaj la traduka, kaj, preter tio, difinus la rilaton de tiuj verkoj kaj aŭtoroj al la pli vastaj ekster-Esperantaj influoj kulturaj, politikaj kaj sociaj, kiuj formis ilian rilaton al E-o, ĝia literaturo kaj ĝia lingvoevoluo. Temus pri malfacila tasko, en kiu nepre devus kunlabori homoj kiuj bone konas la internacian kulturan medion, kiuj samtempe scias kiel loki iun Bakin, Ragnarsson aŭ Montagut ene de la propraj literaturaj kaj kulturaj medioj, kaj kiuj sentas sin hejme en la ĝangalo de la postmoderna kritikista medio. Ĉu troviĝas inter ni la homoj pretaj kaj kapablaj alproprigi tiun taskon? ★

Omaĝo al talento kaj diligento

Vilmos Benczik - Hungario

En la Berlina UK la prezidanto de Belartaj Konkursoj omaĝis festparole al ĉi ties 50-jariĝo kaj al la 75-a naskiĝtago de niaj beletraj korifeoj Marjorie Boulton kaj William Auld. Jen la parolado, kun negravaj ellasoj.


La kunsido de Belartaj Konkursoj estas ĉiujare unu el la plej gravaj eventoj de UK. Tute normala afero, ja en movado kiu ariĝis por disvastigi lingvon, ne povas esti indifera literatura, lingva arto. Literatura kaj lingvo ja estas ĝemeloj, ili fakte ne povas ekzisti unu sen la alia. El la ĉ. 3 mil lingvoj parolataj dise sur la terglobo, ni konas eĉ ne unu en kiu ne ekzistus iaj tekstoj nomeblaj laŭ iuj kriterioj literatura. Interhoma komunikilo kiu estas ne nura kodo — t.e. uzata ne nur sur iu tre specifa kampo —, sed lingvo ampleksanta ĉiujn teritoriojn de la homa vivado, kvazaŭ aŭtomate generas literaturon. Ĉi tiu ja estas frukto de lingvo, sed tiu paralelo validas ankaŭ inverse: literaturo fruktas pli profunde, pli riĉe, pli adekvate lingvon.

Tre frue pri tio ekkonsciis e-istoj, kaj ili aparte stimulis literaturan verkadon. Ili rimarkis ke elstare povas servi al tio literaturaj konkursoj: apenaŭ du jardekojn post la naskiĝo de Esperanto, en 1909 dum la 5-a UK en Barcelono, jam estis lanĉitaj “Floraj Ludoj”.

Precize 40 jarojn poste, dum la UK en 1949 Reto Rossetti — granda artisto, flama amanto de la Internacia Lingvo — iniciatis revivigi la Florajn Ludojn. Jam sekvajare la Estraro de UEA akceptis Regularon de la Belartaj Konkursoj de UEA. Tial BK en la nuna kongreso festas duonjarcentan jubileon.

Antaŭ 22 jaroj, kiam aperis ĝia jubilea antologio *25 jaroj*, Humphrey Tonkin enkonduke skribis ke “la modernaj Belartaj Konkursoj, fonditaj antaŭ dudekkvino da jaroj, estas verŝajne la plej longedaŭraj kaj plej influhavaj el ĉiuj niaj literaturaj konkursoj”. Pri influo kompreneble povas diferencii la opinioj, sed pri la daŭro ne: BK dum la pasinta duonjarcento iĝis unu el la plej stabilaj abutmentoj de la E-literaturo.

Stabileco en la kazo de BK kompreneble ne signifas senŝanĝecon, eĉ mal-



Pokalo
Nova
Talento,
memore
al Henry
Harabagiuj

pli rigidiĝon. Ĝi kontinue adaptiĝis al la ŝanĝiĝanta mondo, kaj dum la jardekoj aldoniĝis novaj branĉoj kaj forfalis aliaj. Baldur Ragnarsson en skizo pri la historio de BK (*25 jaroj*) kvante iom inventaras la unuan kvaronjarcenton: dum la unuaj 25 jaroj estis prezentitaj al la Konkursoj ĉ. 2100 verkoj en ĉiuj branĉoj, kaj estis aljuĝitaj iom pli ol 300 premioj al iom pli ol 100 personoj. Mankas freŝa statistiko, sed ekz. la ĉi-jara nombro de prezentitaj verkoj — pli ol 90 — montras daŭran interesiĝon de verkemuloj al la Konkursoj.

Tamen ne nur kvante, ankaŭ kvalite BK povas fieri pri belaj rezultoj. Multaj el ĝiaj premiitoj intertempe fariĝis klasikuloj de la Esperanta literaturo: Francis, Rosbach, Rossetti, Miyamoto, De Kock kaj ne laste — William Auld kaj Marjorie Boulton, kies verkista gloro kreskis dum la jardekoj tiel alte ke ilia jubileo plej orname etikedas nian nunan kongreson. Ni esperas ne senbaze ke pluraj el la premiitoj de la lasta tempo membris post jardekoj en tiel same imponaj listoj kiel la ĵusa.

Sojle de sia dua duonjarcento BK do povas optimisme rigardi al la estonteco. Se daŭros tiu amo al la lingvo kaj arto kiu ĝis nun karakterizis niajn poetojn, verkistojn kaj — ne malpli grave! — publikon, tiam la sekva jarkvindeko estos almenaŭ tiel rezultoplena kiel la ĵus pasinta.


Ni omaĝas nun al du elstaraj kreantoj de la Esperanta literaturo, kiuj dum la lastaj jardekoj konstruis tiel impone valoran kaj obsede belan vivoverkon ke jam de longa tempo ni rigardas ilin niaj klasikuloj. Temas pri William Auld kaj Marjorie Boulton.

Du el ni, inter ni

La verkaro de niaj du jubileantoj kvazaŭ nerimarkite dum la lastaj jardekoj klasikigis. Ni staras iom perplekse antaŭ tio jam de longe: ja la kreantoj de tiuj imponaj verkaroj ne sidas en iu ebura turo; ili dum multaj niaj kunvenoj babilas, ŝercas, bierumas kun ni. Ili estas simple du el ni; la diferenco inter ni kaj ili kuŝas en tio ke ilin la naturo dotis ne nur per senfina amo al la Internacia Lingvo, sed ankaŭ per neordinara talento kaj diligento. Tial ili kapablis krei verkojn majestajn kaj intime korkaresajn, intelektu streĉajn kaj aŭdace sentimentalajn; unuvorte, ili kreis lingvan arton en lingvo kiun multaj malestime nomas artefarita.

Tial do la titolo de la jubilea libro kiun UEA eldonis honore kaj omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton, fariĝis *Lingva arto*. Al ĝi kontribuis 23 e-istoj el la plej diversaj mondanguloj. Mi devas danki la sorton ke la honoro redakti tiun ĉi libron venis al mi. La tasko ne nur estis agrablega pro la amo al la jubileantoj, sed ankaŭ la plej facila redakta laboro de mia vivo. Ĉiuj petitaj kontribui tuj montris sin pretaj volontege, kaj ili ĉiuj sendis tiel interesajn, videble ame verkitajn kaj zorge poluritajn verkojn ke la redaktoro fakte ne bezonis labori, li nur ĝuis la agrablan situacion de privilegiita unua leganto.

Tiun ĉi volumon nun mi ŝatus kun la sento de plej sincera estimo kaj amo transdoni al Marjorie Boulton. [Red.: William Auld ne povis ĉeesti la kongreson.] Ĝi portu al ŝi la saman senton de estimo, amo, kaj ne laste danko; ne nur de la kontribuantoj kaj de la redaktoro, sed ankaŭ de ĉiuj kongresanoj, la tuta membraro de UEA kaj de la tutmonda esperantistaro! ★



Recenzoj

Linguopolitiko


Neniu ekzistokialo sen diskutado

Por aktiva lingvopolitiko. *Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto, Prago 1996.* Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 71p. 21cm. € 7,10. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Ĉu la Esperanta komunumo bezonas lingvopolitikon? — demandas la dorskovrilo de ĉi tiu nova libro, kiu entenas la aktojn de lingvopolitika seminario okazinta dum la Praga UK en 1996. Por multaj esperantistoj tio estas kvazaŭ demando ĉu butikoj bezonas trovi manieron vendi siajn varojn. La plej komunaj formoj de esperantismo ja asertas ke la elekto de lingvo gravas por socioj, kaj ke en internacia komunikado oni prefere uzu zorge planitan lingvon.

La demandoj diskutitaj dum la seminario kaj plutraktataj en *Por aktiva lingvopolitiko* tamen estas iom aliaj. Ili ĉefe koncernas decidojn pri la strukturo de la lingvo mem, pri ĝia gramatiko kaj la vortprovizo. Dum la mondo evoluas, lingvoj, ankaŭ planitaj lingvoj, devas evolui. Ĉu ni volas gvidi tiun evoluon? Kigrade? Kiuj estu la gvidantoj? Ĉu nur la Akademio de Esperanto?

Evidente, ni bezonas politikon ankaŭ pri tiu temo. Sen racia diskutado kaj konscia agado, E-o riskas iĝi malpli facile lernebla por eksteruloj, kiuj ja devus peni parkerigi la spertulajn strangaĵojn. La lingvo eĉ riskas perdi sian neŭtralecon, se potenco anstataŭ la racio decidos pri la direkto kiun la lingvo prenu. La Esperanta estas movado por raciaj kaj demokratiaj decidoj pri lingvaj temoj. Sen ada pridiskuto de la lingvopolitiko forfalus ĝia plej grava ekzistokialo.



La kontribuoj al *Por aktiva lingvopolitiko* donas bonan bazon por tia diskutado. Ili estas verkitaj de kelkaj el la plej gravaj lingvopolitikistoj en nia komunumo kaj traktas i.a. la “nature” evoluon de la lingvo, la rolon de la Akademio kaj la situacion en naciaj lingvoj.

Rektajn respondojn al la demando ĉu ni bezonas lingvopolitikon donas la esoj de

Renato Corsetti kaj Derlev Blanke. Ambaŭ emfazas la gravecon de bona lingvopolitiko el sia propra perspektivo kaj en sia persona stilo. Corsetti kombinas siajn spertojn kiel patro en E-lingva familio kaj profesiajn konojn kiel lingvisto por elegante kaj sprite pritrakti la demandon ĉu Esperanto jam estas “vere kaj komplete funkcianta” lingvo. Lia konkludo: “(ankaŭ se ni [...] ne tiom malkaŝe emfazas tion, kiam ni parolas al la ekstera publiko), [...] ni estas ankoraŭ malproksimaj de la situacio de ‘normalaj’ lingvoj.” Ni bezonas fortan lingvopolitikon laŭ Corsetti, ĉar nia socio “estas ankoraŭ tro malgranda kaj tro disa por ke ĝi povu efike kontraŭpezi eventuale la unuopulajn strangaĵojn, kiuj celas stiri la lingvon al persone preferataj direktoj.”

Tuj post tiu grava, sed iom teorieca konkludo troviĝas bonega artikolo de Blanke, en kiu la aŭtoro sisteme pritraktas la farindaĵojn, la traktindaĵojn kaj la rimedojn por lingvopolitiko. Blanke konkrete proponas interalie la starigon de Internacia Lingvopolitika Konsilantaro de Esperanto, en kiu reprezentantoj de la tuta lingvokomunumo kunordigadu la tiukampajn aktivadojn. Utila ideo, sed “novaj komisionoj, organizaĵoj kaj aliaj strukturoj en Esperantio ofte estas dekomence mortnaskitaj”, kiel Blanke mem rimarkigas, plej ofte pro manko ne de volo sed de homa forto. Nia komunumo estas malpli granda ol niaj ambicioj.

La plej grava tradicia lingvopolitika institucio en la Esperanta komunumo estas la Akademio de Esperanto. Werner Bornmann (ankoraŭ prezidanto de la Akademio dum la Praga simpozio) eksplikas la pozicion de la Akademio kaj defendas ĝin

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Dašgupto,
Marc van Oostendorp, Humphrey Tonkin.

Eldonas: John Benjamins, Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Abonoj: individua € 46,30; institucia € 99,85.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

Kultura evoluigo

Vasta panoramo por klera leganto

Kulturo kaj teknologio. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. 1997. 64p. € 6,80. **Kulturo kaj evoluo.** Mervyn Claxton. Trad. Johano Rapley. 1998. 60p. € 6,80. **Kulturo kaj sano.** Mervyn Claxton. Trad. Helga Rapley. 1999. 42p. € 5,40. *Ĉiuj:* Trad. el la angla. Rotterdam: UEA. 21cm. Triona rabato ekde tri ekz.

Tri libretoj, kun suma amplekso de nuraj 160 paĝoj, kaj kun unike vasta panoramo al la dilemoj de la nuntempa mondo. Temas pri tri referaĵoj preparitaj por la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo, proklamita de Unesko. La tekstoj origine (en la angla) aperis en eldono de Unesko kaj de Monda Organizaĵo pri Sano. UEA certe trafis almenaŭ du celojn aperigante tiujn ĉi tri referaĵojn en Esperanto: unue, ĝi demonstris al Uneskosian ligitcon al la streboj de tiu monda organizo pri kulturo; kaj due, ĝi prezentis al sia membraro kaj al ĉiuj E-parolantoj legaĵojn kiuj helpas meti la strebojn kaj celaron de la Esperanto-movado en pli vastan kuntekston.

Estas evidente ke tiu ĉi dua celo estas la pli grava, ja la oferto de esperantistoj — neŭtrala lingvo por la homaro — povas esti aŭdata kaj konsiderata fare de la mondo nur se ĝi estas formulita tiel ke ĝi klare prezentiĝas organika parto de la monda problemaro.

La referaĵoj celas ne-specialistan leganton — diras la enkonduko de *Kulturo kaj evoluo*. Estas fakte tiel, tamen necesas aldoni ke la aŭtoroj celis leganton pli ol meze kleran kaj informitan.

Kulturo kaj teknologio kaj *Kulturo kaj evoluo* temas pri interrilatoj de du kompleksaj nocioj (ja teknologio estas koncepto multbranĉa, dum evoluon mi emus



nomi koncepto multtavola). *Kulturo kaj sano* pritraktas — almenaŭ el teoria vidpunkto — temon malpli vastan, kiu tamen el praktika vidpunkto havas signifon distingitan. La koncepto mem pri sano sekvas el la karaktero de kulturo; aliflanke, kuracado estas unu specifa teknologio.

La strukturo de la tri libretoj estas tre simila: post pritrakto de ĝeneralaj aspektoj la aŭtoroj prezentas la problemon enkadre de la specialaj cirkonstancoj de difinita kulturo aŭ mondregiono.

Ne ĉiam oni povas konsenti pri la prezentmaniero kaj la konkludoj, sed tio ja estas komprenebla. La temoj estas terure vastaj, sen klara interna hierarkio, tial iu ajn aliro povus ŝajni certagrade subjektiva.

Tamen foje-foje oni sentas neprajn mankojn. El tiuj mi menciis nur unu, kiu tamen estas sufiĉe grava. *Kulturo kaj teknologio* donas neniun atenton al la komunikada teknologio, kies graveco jam de kelkaj jardekoj — almenaŭ de post la apero de *La Gutenberg-galaksio* de McLuhan — estas vaste rekonata. Ĉi tiu ja havas pli intiman ligon kun kulturo ol eble ĉiuj aliaj teknologioj kune, kaj pri tiu temo vaste verkis* ankaŭ la sociologo Jack Goody, citita de la aŭtoro konekse kun Afriko.

Kaj tute ne menciigas specifa tereno de la komunikada teknologio, nome la rolo de la lingvo, kvankam tiu ĉi tereno, havante ĉiujn atributojn de teknologio, samtempe estas ankaŭ kulturo. Estus bele vidi kiajn konkludojn tirus la aŭtoro el la analizo de la mondaj tendencoj ĉi-kampaj, ja sur ĉiuj pritraktataj terenoj li stre-

bas kontraŭ apliko de teknologioj kiuj ne harmonias kun la kulturo de la akceptanta medio.

Tiu manko kompreneble neniom deprenas el la valoroj de la tri libretoj, kies tralego alportis al la recenzinto mem utilon almenaŭ duflankan: ordigon de konceptoj pli frue eble iom senorde ŝvebantaj en lia kapo, kaj multajn antaŭe ne konatajn interesajn informojn, ekzemple el la historio de teknologio, aŭ pri specifaj kuracmetodoj.

Vilmos Benczik - Hungario

**The Consequences of Literacy*, 1963; *The Domestication of the Savage Mind*, 1977; *The Interface between the Written and the Oral*, 1987.

kontraŭ atakantoj. Laŭ Bormann, la Akademio “estas esenca elemento en la lingvopolitiko de Esperanto” kaj preskaŭ ĉiuj konsentus ke devus esti tiel. Tamen laŭ mia gusto Bormann ne ĉiam estas sufiĉe klara en siaj respondoj al la kritikantoj. La plej fama kazo estas verŝajne tiu de la vorto *komputilo*, kiun nuntempe (laŭ mi) preskaŭ ĉiuj uzas, malgraŭ la konsiloj de la Akademio uzi *komputoro* aŭ *komputero*. Bormann pri tio nur deklaras ke “plurece uziĝas *komputilo*, *komputoro*,

komputatoro, *komputero*, *komputro*, kun iom-post-ioma elstarigo de *komputilo*, tamen restas la multeco de uzataj nomoj”.

Krom tiuj tri eseoj pri la movada lingvopolitiko kaj la Akademio, la libro entenas bonan enkondukon de Humphrey Tonkin al la scienca literaturo pri lingvoplanado kaj artikolojn de YAMASAKI Seikō kaj Amri Wandel pri lingvoplanado respektive en Japanio kaj en la novhebrea. Tiuj artikoloj estas interesaj kaj bone verkitaj, sed la elekto de la japana kaj la novhebrea estas

iom arbitra. Tio estas komprenebla — verŝajne simple mankis en Prago ekspertistoj pri planado en aliaj lingvoj —, sed estas iom malfacile taksii kion la e-istaj institucioj lernu de tiuj du nacilingvaj kontraŭpartoj.

Por aktiva lingvopolitiko donas bonan superrigardon de kelkaj demandoj en la kampo de la Esperanta lingvopolitiko. Estas klare ke ni bezonas tiajn politikojn kaj diskutojn. Ni diskutu plu.

Marc van Oostendorp - Nederlando

Prava konstato, defetisma konkludo

Cxu Esperanto postvivis la jaron 2045? Tazio Carlevaro (1945). Bellinzona: Hans Dubois, 1999. 51p. 30cm. Iksoj anstataŭas ĉapelojn. € 6,00.

Antaŭ 17 jaroj Jerzy Leyk, prezentinte takson pri la kvanto de la E-parolantoj, menciis ke tiaj materialoj "ne estis en e-movado diskonigataj. Tio ja danĝerus al la interna strategio de egvidantaro kaj e-propagandistoj, nutrantaj sin, al la anaron kaj la atakatajn celgrupojn per bombastaj, sed blufaj asertoj pri la granda nombro de e-parolantaro kaj rapida evoluo de la movado" (*Pola E-isto*, 1982: 3-4).

Lastatempe la situacio ŝanĝiĝas. La prudenta analizo de niaj lingvo kaj komunumo iom post iom enradikiĝas ankaŭ ekster la "raŭmismo cirkvito". Pasintjare UEA (E-gravularo?) eldonis diskutkajeron *Esperanto post la jaro 2000*. Flandra E-Ligo (tra Belga E-Federacio aliĝinta al UEA) publikigis eseon de Ziko Sikosek, *Esperanto sen mito*. Kaj laŭ instigo de la pre-

zidanto de Svisa E-Societo (aliĝinta al UEA), je ties laborkunveno en marto 1999, Tazio Carlevaro prelegis pri la estonteco de Esperanto. La prelegoteksto post du monatoj aperis broŝurforme.

Carlevaro konstatas ke la E-movado ne atingis sian ĉefan celon: E-on akceptis nek ŝtatoj, nek interŝtataj organizoj kaj instancoj, nek ordinaraj homoj, kaj ĝia komunika potencialo preskaŭ nulas. Dum la angla atingis la krizan mason de neretroveno kaj nehaltigeble progresas mondscale kiel la help-lingvo, E-o funkcias ĉefe en e-istaj kluboj kaj kongres(et)oj. Do, ne la dua lingvo por ĉiuj, sed unu plia lingvo, fakte lingveto.


Tiu konstato estas pluraspekte prava kaj pravigebla, sed ĝin sekvas defetisma konkludo: "En 2045 supozeble estos la fino de la Esperanto-movado, kiu transformiĝos

al movadeto de kelkaj maljunuloj, kiuj fakte ne povas akcepti, ke io ne funkcias en la tuta demando. En 2100 Esperanto estos muzeajxo". Ni do helpu la enmuzeigon: "Ni estu malgraŭ cxio la administrantoj de la memoro". Carlevaro tamen notas ke "la esperantistoj konstruis sian propran mondeton, kiu iel ekzemple funkcias".

Temas pri la konata fenomeno de "niĉo", al kiu memvole aliĝas personoj ne dezirantaj sekvi la kutimojn de la plimulto malgraŭ la neceso de ekstra investo.

Konservi kaj laŭeble vastigi tiun unikan niĉon, diskonigi ties valorojn kaj spertojn estas tasko pli reala ol enkonduki Esperanton lernejen aŭ solvi per ĝi la lingvan problemon en internaciaj rilatoj. Sed ĉu ni sukcesos fari tion, dum multaj el la influhavaj komunumanoj kaj movadanoj pli ŝatas diskuti pri raŭmismo/pracelismo, neologismoj, ortografio (cetere, la recenzata eseo estas kompostita per x-modo), land-nomo, ol zorgi pri la pluvivo kaj progreso de nia eta parolkomunumo?...

Aleksander Korjenkov - Ruslando



Kulturo: valoro aŭ varo? Kongresa temo de la 81-a UK, Prago, julio 1996. J. Danvy, Dao Anh Kha, A. de' Giorgi, J. Krob k.a. Thaumiers: La KromKancerKliniko, 1996. 19p. 30cm. "La rajto je l'kulturo: Ĉu povas ekzisti kulturo en totalismaj landoj?" kaj "Ĉu demokratio garantias kulturon?" € 4,20.

Lito apud la fenestro. Betty Salt (1907-94). Ilustraĵoj de F. L. Veuthey. Rotterdam: UEA, 1999. 108p. ISBN 92 9017 068 9. 21cm. Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj de kanada instruistino. Kun kelkaj tradukoj. € 4,80. Triona rabato ekde tri ekz.

Okulo. Stefan MacGill (1948). Ilustris Mónica Molnár. Budapeŝto: ILEI, 1999. 40p. 22cm. Amuza lern-helpilo por infanoj. € 4,50.

Paĉjo, kio estas rasismo? (1997). Tahar Ben Jelloun (1944). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Jak Le Puil. Rotterdam: UEA,



UEA lanĉas tri novaĵojn en la "libromonato".

1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. 19cm. Dialogo inter patro kaj filino. La originalo de la maroka Goncourt-laŭreato fariĝis furoraĵo en Francio. € 6,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 71p. ISBN 92 9017 062 X. 21cm. Vidu rec. sur p. 214. € 7,10. Triona rabato ekde 3 ekz.

Vortaro de forsta fako I; II; III. Red. Karl-Hermann Simon k.a. Eberswalde: Förderverein "Lexicon silvestre" e.V. 30cm. Po milo da pri-arbaraj nocioj sistemitaj; alfabeto indekso. Kun proponaro por forstfakaj kompletigoj de PIV. Konsistas el:

Prima pars. 1997. 84p. ISBN 3 931262 21 9. Ringe bind. € 12,90.

Secunda pars. 1998. 82p. ISBN 3 931262 30 8. Bind. € 27,60.

Tertia pars. 1999. 97p. ISBN 3 931262 37 5. Ringe bind. € 18,00.

KOMPAKTA DISKO

MultiDic. Christian Bertin (1949). Por PC kun Windows 95. Pli ol 50 fakaj vortaroj franca-Esperanto kaj E-franca, de agrikulturo, anatomio... ĝis vestaĵoj kaj zoologio. € 21,00.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Bravaj geknaboj el Kroatio

Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapič (1913). Ivana Brlić-Mažuranić (1874-1938). Trad. Maja Tišljar. Zagreb: Kroata E-Ligo, 1998. 108p. 20cm. € 7,50. *Gajnis la premion "Infanlibro de la Jaro 1998" en Belartaj Konkursoj de UEA.*
La kamarado de Petro Nodeto (1933). Mato Lovrak (1899-1974). Trad. Josip Pleadin. Zagreb/Djurdjevac: Kroatia E-Ligo/Matica Hrvatska, 1998. 125p. 21cm. € 9,60.


Jen du kroataj infan-libroj kie ĉefrolas virto, honesteco, persisto kaj kuraĝo. El bona ago iam farita rezultas pli granda oportunaĵo poste. Ambaŭ havas infanajn heroojn; en la unua la eta Hlapič forlasas botfaristan mastron pro ties kolerego kaj mistrakto. Kun minimumaj rimedoj, li helpas al tiuj kiujn li renkontas en sep-taga aventuro. Ne mankas ina heroo, ŝtelistoj kaj malbonuloj. La verkistino, "la kroata Andersen", uzas freŝajn parolturnojn: "domo tiom alta, ke ĝiaj supraj fenestroj ankoraŭ rigardas la lunon" kaj "ĉio estis malhela kiel en fermita skatolo". La verko taŭgas por laŭtleĝado, foje rekte alparolante la aŭskultanton. Ni tiel testis ĝin, kiel serian vesperan rakonton por ok-jarolino. Dekon da tagoj post la finleĝo, ŝi pruvis kiom la rakonto impresis ŝin: "Mi ĝuis la rakonton. Mi havas ŝanĝ-proponon: jen ĝi. Kiam Hlapič kaj Gita eniris la cirkan tendon kaj



plektiston kaj tiu ne avertus pri la fosaĵo — tiam ili enfalus ĝin, krom se la ĉevalo estus tiom saĝa ĝin eviti. Sed la ĉevalo ne povus fine teni tri homojn, ĉar ili estas tro pezaj. Tamen, estus bona ideo kunpreni la ĉevalon."

Teknikaj impresoj: *Hlapič* kun plenkolora kovrilo, broŝurita kun spino, klara granda litertipo, sed iom tro da preseraroj.

vidis la ĉevalon de Gita, kial ili ne forportis ĝin? Ili povus rapidi. Tiam tamen ili ne renkontus korbo-



Petro Nodeto: plenkolora kovrilo, firme bindita. Ene, deko da tutpaĝaj akvarelinkaj ilustraĵoj.

La dua libro rakontas pri sesopa bando de lernejoj, kiuj malkovras ruinan akvomuelejon kaj kune decidas sekrete refunkciigi ĝin. Figuras lojaleco, perfido, solidaro, komuna celo, estreco kaj honesto. Perfido, kiam du grupoj forlasas kaj endanĝerigas la projekton, kaj novaj — ne tuj fidataj — aldoniĝas. Honestaj kaj ĝia malo, ĉar foje ili uzas ruzaĵojn por forlasi la lernejon kaj dediĉi sin al la rekonstruado. Karina klarigas la estran teknikon de Petro: "Se li diras 'Nodeto', la aliaj devas silenti." "Kio devas sekvi?" "Saĝa ago! Sed ankaŭ tio estas saĝa ago — ke oni silentas!"

Dumleĝe ĝenetis la ŝajne arbitraj salto inter pasinta kaj nuna verbo-tempoj, kiel sur p. 42: "Ĉiuj lin postiras. Ili pasas (...). Ili haltis. Ĉiuj aŭskultas." En ambaŭ verkoj la lingvouzo estas bunta, elvokiva kaj larĝiga la vort-trezoron de juna aŭskultanto. Ili estas aranĝitaj en etaj sekcioj, bone dozitaj por po-vespera legado, kun konvena eks-cito-punkto por dezirigi pli. La komenco de novaj sekcioj ripetis informojn, ebligante rebildigon de la antaŭ-taga legado.

Ni rekomendas ilin; al Karina la demando kiu plaĉis pli. "Mi tre ŝatis ambaŭ, eble Hlapič pli — sed nur iomete pli."

Karina kaj Stefan MacGill - Hungario

Pleje gravas la streĉo

La ĉashundo de la Baskerviloj (1902). Arthur Conan Doyle (1859-1930). El la angla trad. William Auld. Jekaterinburg: Sezonoj, 1998. 173p. 20cm. € 8,10.

Ne facilas recenzi ajnan verkon de la aŭtoro de *La infana raso*: oni nepre rapide antaŭjuĝas kaj rigardas aŭtomate bona ĉion el lia plumo. La tasko pli simplus, se Auld ne estus la plej konata Esperanto-verkisto kaj eble nia plej granda poeto, sed nur sinjoro Ajnulo.

Jen do traduko el ege konata ŝerlok-holmsaĵo de Doyle. En *La ĉashundo de la Baskerviloj* ŝerloko Holms, privata detektivo kun senegala sagaco, plian fojon pruvas sin inteligentega kaj trafema homo kapabla elspuri krimulon per plej bagatelaj post-signoj. Sagaco ne ĉiam rimigiĝas kun modesto, kaj foje la ĉefrolulo ŝajnas iom tro mem-kontenta kaj memfida, sed tio kredeble apenaŭ ĝenas en verko de aŭtoro ideologie ranca

kaj klasisma. Kvankam la romano datiĝas de 1902, romantikismo ankoraŭ iom mucide sidas en pejzaĝoj kaj hom-priskriboj.

La traduko — kaj mi supozas, ankaŭ la originalo — estas verkita en "la bona lingvo": legado flue facilas kaj stumbloj mankas, sed same malestas vera eleganto. Ĉi tiu bona lingvaĵo fakte tre taŭgas por la publiko de tiaspeca romano: aventuroj, konstantaj moviĝoj, abundaj surprizoj, ĝusta kaj justa punado por la malbonuloj ktp. Tiaj legantoj volonte kredas (eble nur ene de fikciaĵo) pri la "misaj potencoj" de supernaturaj estaĵoj. Tamen pleje gravas la streĉo. Jen ekzemplo el letero de d-ro Watson al ŝerloko Holms: "En mia lasta raporto mi finis je plej alta noto kun

Barimoro ĉe la fenestro, kaj nun mi havas novajaron jam, kiu, se mi ne eraras, konsiderinde surprizos vin. La aferoj evoluis tiel, kiel mi ne povintus anticipi. Dum la pasintaj kvardek ok horoj ili iĝis parte pli klaraj, kaj parte ili iĝis pli komplikaj" (p. 89).

Nur unu fina rimarko: la Jekaterinburga eldonisto Korĵenkov eminente kontribuis al la eldonado de esperantaĵoj dum la lastaj jaroj, kaj li ja meritas nian dankeman aplaŭdon; sed sur la alia pesil-taso, ni ne povas ne vidi ke la kovrilo de la nuna eldonaĵo rekte malemigas legi la libron. Ni ĉiuj scias ke E-eldonistoj ne naĝas en riĉoj, sed same veras ke ankaŭ etaj rimedoj ebligas belajn — alivorte, aĉetigajn — kovrilojn.

Antonio Valén - Hispanio



Kun viaj kontribuaj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Koran dankon!



OCEANIO: Kreskas komisiono

Brian Fox (634 South Titirangi Road, Titirangi, Auckland 1007, Nov-Zelando; ☎+64/9/817-8244; ✉brianandjackie@abztrak.co.nz) estas la sekretario de la nova Komisiono de UEA pri Oceanio. Nov-Zelanda E-Asocio financos la dissendon de leteroj al esperantistoj en la regiono.

PORTUGALIO: Post letargio

Post letargio lastatempa, iom relanis la movado en Portugalio. Denove okazas regulaj kursoj, reaperas la bulteno de Portugal E-Asocio. La instruon fakan reprenis kaj profesie strukturis João Santos. La 4-an de sep. Jorge Camacho prelegis en la PEA-sidejo al dudeko da homoj pri la movado en Iberio. Samtage filmis tie la nova Lisbona TV-kanalo CNL, por 30-minuta programo pri E-o (18 sep.), en



FRANCIO: Ĉio en ordo en la nordo

Akademiano André Cherpillod (meze en la foto) verve prelegis pri Esperanto al 80 interesatoj en la urbodomo de Villeneuve d'Ascq la 22-an de okt., post tre favoroj enkondukaj vortoj de urbestro (kaj eŭro-deputito) Gérard Caudron (maldekstre). La 29-an de okt. Denis Denetti, prezidanto de Norda E-Federacio, kaj la kantisto Jacques Yvert prezentis Esperanton al 50 personoj en Ronchin.

Pri ĉi tiuj kaj aliaj aktivaĵoj en Norda Francio raportas la TTT-ejo <http://home.nordnet.fr/~bdenetti>. (D. Denetti)

kiu intervjuigis la prezidanto de PEA, Miguel Faria de Bastos, kaj Gonçalo Neves. La plej atentovekaj temoj estis denaskeco kaj Esperanto en Interreto. La 25-an de sep. la ĵurnalistino Elsa Resende (el Lusa, la ĉefa portugala novaĵagentejo) restis 6

horojn en la sidejo kaj longe intervjuis ĉefajn aktivulojn, i.a. Santos, Neves, Adelino Franco Simões kaj la movadan doĵenon Werther Sacramento. Sekve, aperis artikolo en *Diário de Notícias*, la ĉefa portugala taggazeto. (G. Neves)

JORDANIO: Gasto el Romo

Prepate al la jordaniana antaŭkongreso de la 85-a UK, UEA-vicprezidanto Renato Corsetti (dua de maldekstre) vizitis Amanon, la ĉefurbon de Jordanio, inter la 15-a kaj 17-a de nov., kiel persona gasto de la ministro pri edukado, Faisal Al-Refou'h (dekstre). Corsetti renkontis plurfoje la ministron

kaj liajn ĉefajn oficistojn. Al-Refou'h donis sian aŭspicion al la antaŭkongreso, kaj certigis senpagan uzon de 100-persona salono en la urhomeza Reĝa Centro pri Kulturo la 22-an kaj 23-an de julio. La ministro — profesoro pri internaciaj rilatoj en la universitato de Amano — mem parolos en la inaŭguro pri "Tutmondiĝo kaj la araba mondo".

La unuan renkontiĝon ĉeestis ankaŭ Natasha Twal (maldekstre), ĵurnalistino de la reta novaĵagentejo Arabia.On.Line, ekinteresiĝinta pri E-o pro la anoncoj kiujn UEA lokis pasintan decembron, kadre de Kampanjo 2000, en la jordaniana gazetararo.





por 230 infanoj (Fort Stockton, Teksaso) ĝis supera kurso por 4 plenkreskuloj, kun la libro *Ili vivis sur la tero*, hejme ĉe la instruanto (en Santa Barbara, Kalifornio).

En la konstruĝeniera fakultato de la Budapeŝta Teknika Universitato de unu jaro E-o estas lernobjekto elektelebla kiel deviga fako. En la printempa semestro prof. Ottó Haszpra (□haot@freemail.c3.hu) gvidos 30-horan kurson, surbaze de sia pasintjare eldonita lernolibro *Esperanto de la aboco ĝis la supera grado*.

INSTRUADO: 1200 en Usono

Laŭ *Kvaronjara Bulteno* de Amerika Asocio de Instruistoj de E-o, en 1998/99 okazis almenaŭ 37 E-kursoj en 19 ŝtatoj usonaj. 29 el ili estis parte aŭ tute elementaj. Entute menciigis 1200 partoprenantoj. La speco de kursoj varias de deviga duonhora ĉiusemajne

INTERLINGVISTIKO: Poznań pluas

Daŭras la postdiplomaj studoj interlingvistikaj ĉe Univ. Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando). De 20 ĝis 24 sep. 6 studentoj



el 6 landoj (meza aĝo: 49 jaroj) partoprenis la kursojn de Věra Barandovská-Frank (interlingvistiko), István Ertl (literaturo), Ilona Koutny (sintakso) kaj Blazio Vaha (semantiko, leksikologio). Informas pri la kursoj d-rino Ilona Koutny, Lingvistika Instituto, UAM, Międzychodzka 3-5, PL-60-371 Poznań; ☎/☐+48/61/861-85-72 aŭ 817-28-73; □ikoutny@amu.edu.pl.

• Intensas studsemajnon sekvis kultura semajnfino, la 15-a ARKONES. La prelegoj (T. Chrobak, I. Ertl, Z. Galor, Z. Kornicki, L. Wunsch) kaj diskutoj fokusiĝis al la "Fina venko". Aktoris Jadwiga Gibczyńska kaj Jerzy Fornal, barde kantis Georgo Handzlik. (I. Koutny, I. Ertl)

LITERATURO: Thijssen kaj E-o

En la Amsterdama muzeo pri la nederlanda verkisto, pedagogo kaj E-simpatianto Theo Thijssen (1879-1943), kies romano *La nevenkebla ĝeno* aperis ankaŭ en la E-traduko de F. Faulhaber (1948), malfermiĝis ekspozicio (26 sep. – 1 majo 2000) kun la titolo "Lingvo sen limoj. Theo Thijssen kaj E-o". Vizitebla de ĵaŭdo ĝis dimanĉo 12.00-17.00; Eerste Leliedwardsstraat 16; ☎020-4207119; <http://members.tripod.com/~theohtijssen>.



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldencojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondeblas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

MEMORIGAĴOJ DE SINMORTIGINTO

– de Spirito Camilo Castelo Branco, pri sia vivo en Transmondo, 554-paĝa, eldonis Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz. Mendebila ĉe UEA.

NOVA RETA ADRESO

de Gerrit Berveling kaj Madzy van der Kooij: gberveling@freeler.nl. Tera adreso: Mussenhage 8, 8011 BH Zwolle, NL.

FELIĈAN KRISTNASK-FESTON

deziras tutfamilie István Ertl al ĉiuj malhavontaj liajn salutkartojn, neksribitajn pro tempo-premo ĉi-revua.

12 GEJUNULOJ

(inter 18 kaj 35 jaroj) volas korespondi. Rubén Feldman-González, Av. Islas Fiji 46, Colonia Santa Mónica, Mexicali BCN 021339, Meksiko.

POR EKSPOZICIO KAJ STIMULE

al novaj lernantoj, bonvenas E-periodaĵoj kaj poŝtkartoj kun E-lingva mesaĝo el ajna mondregiono ĉe CILB, Curso de Esperanto, CP 5049, Brazilândia, BR-72701-970 Brasília - DF, Brazilo.

UZITAJN ŜUOJN KAJ VESTOJN

mi aĉetas bonpreze. Handikapuloj vendas kartojn kun E-kaj afrikaj motivoj, ceramikajojn, lignajn skulptaĵojn. S-ro Emilo Malanda Nianga, Esperanto Kultura Movado, Univ. de Kinshasa, B. P. 839, Kinshasa XI., Dem. Resp. Kongo.

MUZIKO: Aĉa, laŭta, netaŭga

Multaj muzikaĵoj estas troveblaj kaj foje leĝe elŝuteblaj el TTT. Ĉe <http://www.mp3.com> oni trovas almenaŭ du E-rilatajn: la instrumentan pecon *Esperanto* de Mike Romaine (<http://www.mp3.com/mr>) kaj la Esperante kantatan *Aĉa, laŭta, netaŭga* de

la Berlina punk-bando Drei Flaschen inna Plastiktüte ("Tri boteloj 'n plasta sako"). (Kune)

La germana hiphop-grupo Freundeskreis (vidu jun., p. 117) ricevis la premion "Ora Disko" pro la 250 000-ekzemplera vendiĝo de sia kompaktdisko *Esperanto*. (W. Klag)

FRIZADO: Verda hararo?

Afrika esperantisto, kiu fuĝis al Sud-Afriko el tanzania rifuĝejo pro la malbonaj kondiĉoj, afiŝe altiras la atenton al sia "Esperanta frizejo" apud vojo. Preterirantoj scivolos kio estas Esperanto kaj kia estas Esperanta hararstilo.

Se vi volas konatiĝi kun la frizisto, kontaktu: Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi, Finnlando; □raita.pyhala@lestijarvi.fi.



DE' GIORGI: Rekorda Komo?

"Como estas la sola urbo (en la mondo) kun du honoraj membroj en UEA" — asertis la loka gazeto *La Provincia*. Efektive, post Giordano Azzi, alia loĝanto de la nord-itala urbo iĝis ĉi-jare Honora Membro de UEA (vidu okt., p. 170): Aldo de' Giorgi (75-jara). Ĉu *La Provincia* pravas pri la rekordo?

DE SMET: Premio Pirlot

Premio Germain Pirlot por la jaro 1999 iris al prof. Wim de Smet (67-jara) pro lia verkaro pri Nova Biologia Nomenklaturaro. La senato de Akademio Internacia de la Sciencoj, kiu ĉiujare atribuas tiun premion al scienca verko plejparte en E-o, opiniis ke tiu verko prezentas kuraĝan, science bone bazitan alternativon al la ekzistanta tradicia sistemo. Tiusence ĝi paralelas al la situacio de la Internacia Lingvo.

AIS invitas aŭtorojn kiuj en 1999 publikigis sciencon verkon en Esperanto kaj volas konkursi pri la venontjara Premio Pirlot, sendi ekzempleron por eksperto al la responsa senatano de

AIS: Hans Michael Maitzen, Instituto pri Astronomio, Türkenschanzstr. 17, AT-1180 Wien, Aŭstrio. (Ret-Info)

WALTER: Greziljono plena

La granda salono de Kastelo Greziljono estis plenplena kiam la konata lingvistino Henriette Walter, la plej proksima disĉiplo de André Martinet (nov., p. 194) prelegis pri "Lingva diverseco en Eŭropo" la 26-an de junio, laŭ aranĝo de i.a. Marie-Thérèse Lloancy. Walter jam plur-okaze montris sian intereson pri Esperanto, i.a. dum radioelsendo (vidu marto, p. 56). (*Norda Gazeto*, F. Lo Jacomo, H. Masson)

PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS. Red. O. Buller kaj R. Corsetti. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 92 9017 061 1. 24p. 30cm. Prezo: € 5,50.

Studkajero pri la temoj de la Manifesto de Prago: demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco de Esperanto, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.



YVART: Koncertoj en Kroatio

La konata franca kanzonisto Jacques Yvart (59-jara) kantis la 17-an de okt. en Zagrebo por esperantistoj en la prestiĝa zagreba muzeo Mimara. Pli ol 200


personoj ĉeestis lian koncerton "Bonan tagon, paco", aranĝitan de Kroata E-Ligo kaj Franca Instituto. Sekvis du pliaj koncertoj, plejparte franclingvaj, en Osijek kaj Varaždin.



William Auld sportante kun lia filino ĉe marbordo. (El la libro *75 jaroj*, de Sezonoj)

AULD 75-jara

La 6-an de novembro atingis sian 75-jaran naskiĝdatrevenon la brita korifeo de la Esperanta literaturo, kiun oni pasintjare kandidatigis por Nobel-premio. Ĉi tiu fakto cetere daŭre generas menciojn mondvaste tra la gazetaro: ekzemple, la ĵurnalo *Chicago Sun Times* la 20-an de sep. eĉ reprenis la unuan ĉapitron de *La infana raso*. (Magdeburga Folio)



Kompleze de Denis Demaille

Jacques Yvart

La 18-an de okt. Kroata Televido elsendis intervjuon kun Yvart kaj Spomenka Ŝtimec; pluraj radio-intervjuoj kaj gazet-artikoloj aperis pri lia gastado en Zagreb. Ĝisosta pacifisto, Yvart finis sian restadon en Zagrebo per renkontiĝo kun handikapitaj infanoj kiuj lernas Esperanton. (S. Ŝtimec)

OMAĜOJ

Ni kore gratulas okaze de ilia naskiĝtago

- la 95-jaran ĉinan verkiston Bakin, Honoran Patronon de UEA (la 25-an de novembro);
- kaj la majstran tradukiston Fernando de Diego, Honoran Membreon de UEA, kiu 80-jariĝis la 2-an de novembro.

Ni ankaŭ rememoras la kreon de la moderna UEA, Ivo Lapenna, kiu estus fariĝinta 90-jara la 5-an de novembro.

Thorsen-apogoj al naŭ E-bibliotekoj

UEA disdonis por la tria fojo subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Entute 14 E-bibliotekoj sendis peton. La komisiono aparte ĝojis ke unufoje venis petoj ankaŭ el Sud-Ameriko.

La UEA-estrarano pri kulturo, Tacuo Huĝimoto, ĝenerala sekretario Michela Lipari kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller dividis la ĉi-jare disponeblan sumon de 1825 eŭroj inter 9 petintoj. Ili ĉiuj ricevas librojn surbaze de siaj dezirlistoj.

La subvencioj estas: Bariloĉa Esperanto-Rondo, Argentino (€ 275); Bona Espero, Brazilo (€ 250); Pernambuka Esperanto-Asocio, Brazilo (€ 275); Ĉina Esperanto-Biblioteko (€ 225); Hejmoj, Francio (€ 275); Biblioteko Ramon Molera, Hispanio (€ 150); Vicenza Esperanto-Centro, Italio (€ 125); Esperanto-Klubo "Orstelo" de Tzaratanana, Madagaskaro (€ 125); kaj Esperanto-Klubo "Ora Pordego" de Kievo, Ukrainio (€ 125).

Petoj por la aljuĝo en 2000 devos atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2000.

Ili devas konsisti el listo de dezirataj libroj ordigitaj laŭ prefero, ĉar la subvenciojn oni ricevas ne kiel monon sed kiel librojn. Bonvenas ankaŭ priskribo pri la biblioteko. Konsiderataj estas nur bibliotekoj ne financataj de ŝtata, urba aŭ alia ekstermovada instanco.



- *Moto-Magazine* (n-ro 155, <http://www.motomag.com>) informis sur du paĝoj pri Motorbikla E-Rondo (André Rambeaux, La Fagne 27, Chimay, BE-6460 Belgio; emcx@skynet.be).
- Tri kapvortoj en la franclingva eldono de la codoroma enciklopedio *Encarta* informas pri Esperanto ("...la plej disvastiĝinta

